

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

En Seula UK ni aktivis

Sibayama Zyun'iti



Okaze de la 102a Universala Kongreso (UK) en Seulo, Koreio, 10 el niaj membroj, do sesono el ni Ne-profitocela Organizo Esperanto Jokohama partoprenis. Inter ili estis s-ino Kayahara Rieko, unuafoje partopreninta la UK-on, kaj veterano Tanigawa Hiroshi, kiu multajn fojojn vojaĝis eksterlanden per Esperanto, tamen unuafoje la eksterlandan UK-on.

En la 22a de julio estis Movada Foiro, kie diversaj organizoj prezentis sian aktivadon kun stando en gazonejo de la kongresejo, la Fremdlingva Universitato de Koreio. Nia organizo kunhavis standon kun Vjetnama Esperanto-Asocio kaj Japana Esperanto-Instituto (JEI). Precipe kun JEI, ni kune reklamis pri ĉi-aŭtuna 104-a Japana Esperanto-Kongreso en nia urbo, dum JEI ankaŭ reklamis pri la venontjara 105-a Japana Esperanto-Kongreso okazonta en Nara. La libro de nia membro, nome la traduko de “La nanoj en domo kun granda zerkovo” estis ankaŭ prezentita.

Pri tiu libro, nome infanliteraturo tradukita de s-ino Itabaŝi Micuko, estis prezentita en Aŭtora Duonhoru en la 27a ĵaude, de s-ro Iŝino

Joŝio, la kunlaboranto de la tradukado.

Paralele al la ĉi-supra programero okazis Scienca Kafejo, kie kelkaj popularsciencaj prelegetoj okazis, kaj tie Sibayama Zyun'iti prezentis prelegon “Internacieco / nacieco ĉe mappsimboloj kaj vojsignoj”.

Okaze de la fakkunsido KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado) en la 25a marde, s-ro Inumaru Fumio, la vicprezidanto de KAEM prezidis, kaj s-ro Suzuki Keiichiro raportis pri la japana movado nome de Japana Esperanto-Instituto.

La kongreso utilis ankaŭ kiel personaj kontaktoj. S-ino Doi Ĉieko ricevis lernolibron de Kanado (franclingva) kaj de Uzbekio (uzbeklingva), kaj dankis tajlandanon pro la sendado. La lernolibroj estos prezentitaj en nia ekspozicio.



foto liverita de s-ino Kayahara Rieko

Baldaŭ Ekspozicio pri Esperanto, kun "la lernolibroj de sia nacia lingvo"

Dato: la 11a, 12a, 13a de septembro

Loko: en la kutima kunvenejo en Jokohamo

En nia bulteno n-ro 327, ni prezentis lastajaran rezulton de la ekspozicio de lernolibroj. Tiu evento denove okazos en septembro.

Ĉi-jare ekspoziciotaj lernolibroj venis el jenaj landoj.

Cetere, tiu ekspozicio denove okazos kadre de la novembra Japana Esperanto-Kongreso.

(en la ordo: lando / lingvo)(substrekitaj estas nova ĉi-jare)

【Azio】

(Ĉinio / la ĉina)

(Hindio (Barato) / la bengala)

(Japanio / la japana)

(Kazaĥstano / la kazaĥa)

(Koreio / la korea)

(Mongolio, la mongola)

(Taĝikio / la taĝika)

(Tajvano (Ĉinio) / la ĉina)

(Tajlando / la tajaj)

(Uzbekistano / la uzbeka)

(Vjetnamio / la vjetnama)

【Eŭropo】

(Belgio (Flandrio) / la flandra)

(Bulgario / la bulgara)

(Ĉeĥio, la ĉeĥa)

(Ĉuvaŝa Respubliko en Rusio / la ĉuvaŝa)

(Francio / la franca)

(Germanio / la germana)

(Irlando / la irlandaj)

(Italio / la itala) (el 2 personoj)

(Kroatio / la kroata)

(Litovio / la litova)

(Nederlando / la nederlandaj)

(Rumanio / la rumana)

(Rusio (de la Ĉuvaŝa Respubliko) / la rusa)

(Slovakio / la slovaka) (ankaŭ lastajare)

(Svedio / la sveda)

(Ukrainio / la ukraina)

【Afriko】

(Konga Demokrata Respubliko / la svahila)

【Ameriko】

(Argentino / la hispana)

(Ĉilio / la hispana)

(Kanado / la franca)

(Meksikio / la hispana)

【Oceanio】

(Aŭstralio / la angla)

Noto: La libro n-ro 22 en la junia numero de nia gazeto (n-ro 327) ne estas la slovaka, sed la ĉeĥa.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj

(ĝenerale en Kanagaŭa Kenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso "Eseoj" por legi "Tamen ĝi moviĝas!"


(2) "Jokohama Salono": 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj", 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Posttagmeza klaso "eriko" por legi "La Zamenhof-Strato" gvidata de Doi Ĉieko

(2) Antaŭtagmeza klaso "Belĉielo" por legi "Punkuino", gvidata de Doi Ĉieko

*Krome neregule du fojojn monate, la Klaso "Belflora" por legi libron "Punkuino", gvidata de Doi Ĉieko



slovaka



litova

Eseo

La Usonaj Militaj Instalaĵoj en Jokohamo

Tanigawa Hiroshi

La centra parto de la urbo Jokohamo estis detruite ruinigita je la 2-a Mondmilito, kiu finiĝis la 15an de aŭgusto 1945. Kaj 15 tagojn poste en la 30a de aŭgusto Douglas MacArthur, Ĝenerala Komandanto de la Aliancarmeo, surlandiĝis ĉe Flughaveno Atsugi, kaj venis rekte al Jokohamo samtage. La Provizora Sidejo de la Aliancarmeo lokiĝis ĉe la Doganejo de Jokohamo. Tuj komenciĝis grandskala rekvizicio kovrante la grandan parton de la urbocentro kaj ĉiujn kajojn de la Haveno de Jokohamo. Tio kaŭzis gravan malfacilon por la rekonstruo de Jokohamo. Rekviziciitaj estis la rare sendamaĝe restintaj domoj, oficejoj, teatroj, magazenoj, lernejoj ktp. La ĉefoficejoj de komerco kaj financo translokiĝis al Tokio. Jokohamo perdis ĉefmotoron por postmilita releviĝo.

En Jokohamo lokiĝis la Komandejo de la Usona Armeo-8. Dum la jokohamaj civitanoj suferegis de la manko de ĉiaspecaj vivnecesaĵoj, riĉaj loĝdomoj kaj duoncilindraj armebarakoj okupis la centran parton de la urbo. Ne mankis ankaŭ amuzaj instalaĵoj por la usonaj armeanoj. — *“Ĉiuvespere okazis prezentaĵoj kaj filmoj. La soldatoj ĉiutage ĝuis sportojn en sportejo. La tuta urbo pleniĝis de amerika kulturo. La riĉaj vivoj tie vidataj estis por tiamaj japanoj aspirindaĵoj, kaj ankaŭ simbolo de la demokratio. La amerika kulturo alportita pere de la usona armeo restis ĝis poste en Jokohamo, kaj tio fariĝis unu el la specialaĵoj de Jokohamo”*. (Kurita Naoja; *“La Usonarmeaj Militbazoj en Kanagawa”* Yurindo 2011)

La rekvizicio kulminiĝis en 1952 kun entute 1200 hektaroj da tereno kaj 112 instalaĵoj.

Kial tiel intensa “rekvizicio” en Jokohamo?

En la fono estis la severa postmilita kontraŭstaro de Usono kaj Sovet-Unio. La eksplodo de la Korea Milito en junio 1950 pli prokrastis la redonadon. Ene de 20km dis de Jokohamo troviĝis gravaj militbazoj; Mararmea bazo ĉe Yokosuka, Flughaveno ĉe Atsugi, Bazo ĉe Zama, Proviantejo ĉe Sagamihara. Ili funkciis tre konekse kun la instalaĵoj en Jokohamo..

La urbo Jokohamo starigis en 1951 *La Komitaton por Rekonstruo de Jokohamo*, kaj persiste penadis cele al la redonado de la terenoj

de la usonaj militaj instalaĵoj. Depost 1952 kiam la Traktato por Paco validiĝis, la redonado de la rilataj terenoj estis akcelita en la centro de la urbo. Rilate la havenajn instalaĵojn; Kajo Yamashita en 1947, Kajo Oosambashi en 1952, Kajo Shinkōfutō en 1966. *La Hotelo New Grand* estis redonita en junio 1952.

La redonado de la usonarmeaj instalaĵoj kun la tereno fariĝis grava temo: Kiel utiligi la postrestintajn areojn.

© *“La Komunika Stacio de Fukaya”* : ĉirkaŭ 77ha. Redoniĝis en junio 2014; planata publikaj verdejoj, vastasfera publika rifuĝejo k.c.

© *“La Komunika Instalaĵo de Kamiseya”*: ĉirkaŭ 240ha. (4-oblo de la Tokia Disneyland). redoniĝis en junio 2015. Publikaj instalaĵoj, enurba agrokulturo k.c. estas planataj.



La Komunika Instalaĵo de Kamiseya, Jokohamo (liverita de la Sekcio de Usonaj Militaj Instalaĵoj, la urbo Jokohamo. fotita en 1982-05-28.)

La usonarmeaj instalaĵoj en Jokohamo , nun (majo, 2017)

© *“La Loĝareo de Negishi”*: ĉirkaŭ 43ha, ankoraŭ ne redonita, sed ĉiuj usonaj loĝantoj retiriĝis ĝis decembro 2015. De antaŭe intermikse loĝita kaj uzita de japanoj.

© *“La Petrolstokejo ĉe Tsurumi”*: ĉirkaŭ 18ha. ne redonita

© *“La Norda Kajo de Jokohamo”*: ĉirkaŭ 52 ha. ne redonita.

© *“La loĝareo en Ikego (tereno en Jokohamo):* ĉirkaŭ 37ha. 171 loĝdomoj konstruiĝos. (interkonsentite en Japana-Usona Traktato)

La 104a Japana Esperanto-Kongreso

en Jokohamo, Kanagavo, la 3a-5a de novembro 2017

Loko: Kanagawa Roudou Plaza (Yokohama-shi Naka-ku Kotobuki-cho 1-4)

Organizas Japana Esperanto-Instituto, NPO Esperanto Jokohama

Kongresa temo: Haveno peras, Esperanto peras

Kontakta retadreso: jek2017@jei.or.jp



Jokohamo 2017

La 104-a Japana
Esperanto-Kongreso



Prelegoj pri la kongresa temo

- ① **KIMURA Goro Christoph** (profesoro de Sophia Universitato, lingvisto pri socilingvistiko): “Kion Esperanto povas oferti al la hodiaŭa mondo?” (en la japana, kun Esperanta traduko)
- ② **Dieter KLEEMANN** (loĝanta en Germanio, kuracisto): “Haveno peras, Esperanto peras” (en Esperanto, kun japanlingva traduko)

Aliaj prelegoj

- ③ **Robert KAMIŃSKI** (sekretario de Pola Esperanto-Asocio, vizitanta kun la helpo de Pola Instituto en Japanio) : “Zamenhof en Varsovio, lia vivo kaj la tempo malfacila por Esperanto” – okaze de 100 jaroj post la forpaso de Zamenhof.
- ④ **Ulrich LINS** (la aŭtoro de *La danĝera lingvo*) : “La esperantisto Rudolf CARNAP” – pri germana filozofo, june eklerninta Esperanton.

Okazos ankaŭ prelegoj de japanaj esperantistoj pri diversaj temoj.



Kongresaj memoraĵoj

- ① **Gvidlibro pri Jokohamo** en Esperanto, kompilata de NAMBA Fumiharu

Nun planata estas la 3-a Versio. Ĝi enhavos ankaŭ eseojn nomatajn Hamalogio, t.e. studetojn pri Jokohamo (kiun lokanoj mallonge nomas “Hama”).

- ② **Esperanto en Kanagavo – Historio de Esperanto-movado en Kanagavo** en la japana, kompilata de DOI Ĉieko

Urbo Jokohamo estas la ĉefurbo de Gubernio Kanagavo. La gubernio Kanagavo estis lulilo de Esperanto-movado en Japanio.

Tiu ĉi paĝo origine aperis en “La Revuo Orienta”.